

Leterkesto, 6.

La kreskanta distanco disiganta la averaĝan esperantistaron de la elito legema
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.05.02 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni tute aparte salutas nian nederlandan aŭdantinon Mila VAN DER HORST-KOLINSKA en Den Haag, kiu sendis 13 aŭdraportojn kun interesaj rimarkoj. Kiel pluraj geaŭdantoj ŝi informiĝis pri la libro, en kiu estas legebla la novelo 'Tamen perdota' de Edmond Privat.

A.- Tiu novelo 'Tamen perdota' aperis en la libro 'Junaĝa verkaro' de Edmond Privat eldonita de Regulo PEREZ en la kolekto Stafeto en la jaro 1960. Antaŭ unu jaro ĝi estis reaĉetebla ĉe UEA.

Cl.- Grava rimarko de Mila VAN DER HORST-KOLINSKA prelegigos nin hodiaŭ pri la kreskanta distanco, kiu disigas la hodiaŭan averaĝan esperantistaron de la elito legema. Nia nederlanda aŭskultantino esprimis sian malŝaton al aŭtoroj kiaj Karolo Piĉ, Reinhard Haupenthal, Fernando De Diego, Lorjak, kiuj estas karakterizaj de la hodiaŭa esperanto-literaturo. Ni citas ŝin:

A.- "Mi sukcesis aŭdi vin kelkfoje je diversaj lokoj kaj horoj. La enhavo de la disendoj estis tre interesa, do kun agrablo mi aŭskultis ĝin kelkfoje. En la parto, kie vi menciis verkistojn uzantajn nekutiman lingvaĵon mankis la nomo LORJAK. Li kapablas tre interese verki, sed pro nekutima uzo de la lingvo mi ne tiom volonte legas lin. Mi tre bedaŭras, kiam talentaj homoj, se temas pri verkado, pro uzo de nekutima lingvo fuŝas mem siajn verkojn. Ja, la baza lingvo estas tiom riĉa, se oni kapablas uzi ĝian riĉecon, sed jes, la homa naturo estas jam tia, ke ne kapablas akcepti tion, kio jam funkcias kaj bone funkcias sed nepre deziras plibonigi ĝin laŭ propra maniero kreante strangaĵojn. Pro tio mi persone ne legas la librojn de tiuj aŭtoroj, kiujn vi menciis en via disendo, kiel Piĉ, Haupenthal, kaj similaj."

Cl.- Tiu vidpunkto de Mila VAN DER HORST-KOLINSKA bone respegulas ĝeneralan sintenon de la esperanto-publiko, kiu estas tre konservativema lingve. Tiu konservativismo certe protektas la lingvon kontraŭ la proponoj de lingvo-reformemuloj. Sed aliflanke ĝi malhelpas la saman publikon riĉigi siajn vortprovizon kaj esprimeblojn en kontakto kun modernaj verkistoj, kiuj verkas iom aliel, ol komencantoj. Ni ne forgesu, ke la lingvaĵo de la novelo Tamen perdota de Edmond Privat siatempe ŝokis la konservativemulojn kaj ankoraŭ ŝokas tiujn, kiuj ne kapablis asimili la senperan verbigon de la adjektivaj vortelementoj. 'Velboatoj rapidas'. 'Abismo danĝeras' tie skribis Edmond Privat anstataŭ 'Velboatoj veturas rapide' kaj 'Abismo estas danĝera'.

A.- Leksike multaj nunaj aŭtoroj sentas la bezonon esprimiĝi per tre precizaj terminoj, kiujn la lingvo ne posedas.

Cl.- El tio fontas ilia bezono je neologismoj, kiel siatempe diris Zamenhof aŭ novismoj kiel nuntempe diras Piĉ per lingvouzo pli esperanta. La riĉiĝo leksika ne nur sekvas la vojon de la ekuzo de novaj vortelementoj, ĝi ankaŭ eksperimentas novajn kunmetaĵojn aŭ novajn vortanalizojn. Anstataŭ diri lingvistiko, pli kaj pli oni diras 'lingviko' pro la influo de la japanino Nagata WOESING. Tio estas kompleksa lingvo- fenomeno, kiun malmultaj provas observi kaj analizi. Ni estas tro proksimaj al ĝi, por ĝin bone kompreni.

A.- Tamen leksikaj demandoj ne devus fermigi al ni verkojn, kiuj povus fajnigi nian lingvo-uzon.

Cl.- Vi pravas. Sed por tio, oni devas senti la proprajn leksikajn kaj esprimajn mankojn. Kiam oni tradukas beletraĵon, kiu priskribas ĉiutagaĵojn, tiam oni ofte sentas la leksikan malriĉecon de esperanto. Kaj kion diri pri la teknika lingvo. Ekzemple ege malriĉa estas nia lingvo, kiam oni provas ĝin uzi por geografiaj kaj pejzaĝaj priskriboj. Al ĝi mankas adekvataj precizaj terminoj ofte abundaj en la naciaj lingvoj, ĉar ili fontas el la lingvaĵo kamparana, kiu ne ekzistas en Esperanto. Tiurilate vere malriĉega, mizera eĉ, estas Esperanto, kaj tio malfavoras ĝian kulturen disvolviĝon. Tial mi komprenis, ke aŭtoro kiel Karolo PIĈ, kiu fajne kaj elvokive priskribas pejzaĵojn, sentis la bezonon ekuzi la vorton 'hilo' por monteto kaj kelkajn aliajn novismojn, por rakonti pri montoj, valoj, riveroj kaj ebenaĵoj. Estas eĉ strange, ke la esperantistoj, kiuj ŝatas tiom vojaĝi, ne sentis la limigitecon de sia pejzaĝ-priskriba vortaro. Sed la nova generacio, kiu multe parolas, pli kaj pli sentas tiujn lingvajn mankojn kaj provas ilin solvi diversmaniere.

A.- Esperanto estas nuntempe en fazo de asimilado de tre specifaj vortelementoj kaj esprimoj, kiuj eniras la literaturon per karakterizaj verkoj. Tiuj beletraĵoj estas eble rezervitaj al speciala publiko, kiun ne timigas kelkaj nekutimaĵoj leksikaj aŭ stilaj.

Cl.- Tre verŝajne. Sed ia averaĝa publiko, kiu kontentiĝas je legado de revuoj nebeletraĵ kaj de facilaj legolibroj, pli kaj pli distanciĝas lingve de la legantaro de la modernaj esperanto-verkistoj. Ili eĉ havas la impreson, ke neniuj legas tiujn librojn kun novismoj. Sed kiam oni vendas esperanto-librojn, tiam oni konstatas, ke la modernaj aŭtoroj estas ĝojige aĉetataj kaj legataj. Tra ili verŝajne disvolviĝas la stilaj kaj leksikaj provoj propraj al la nuna tempo.

A.- Okupiĝante pri la libroservo de Kultura Centro Esperantista ni konstatis, ke multaj esperantistoj, kiuj donas la impreson flue paroli Esperanton, tamen apenaŭ kapablas legi eĉ la facilajn 'ĉu-romanojn' de Johano Valano. Kiel vi klarigas tion?

Cl.- Ilia lingvo-uzo restis ligita al tiu de Esperanto de la tridekaj jaroj, kiujn kelkaj nomas la klasika lingvo-uzo. Ĉe Claude PIRON ili trovas la modernan parolarton, kiu naskiĝis en la jaroj kvindekaj kaj sesdekaj en la medio de TEĴO. La malfacilaĵo ne estas leksika, sed frazkonstrua.

A.- Sed formiĝis klientaro, kiu aĉetas preskaŭ nur pironaĵojn, kaj kiu vigle kritikas la aliajn modernajn aŭtorojn.

Cl.- Tiuj legantoj identiĝis kun lingvo-uzo kaj ŝokiĝas en kontakto kun alia lingvaĵo. Iom saman fenomenon oni rimarkas kun Rikardo ŜULCO, kiu havas siajn adeptojn. Tiurilate ni troviĝas antaŭ iom alia situacio: la ŝulcismo reprezentas skismeman sintenon en la maniero interpreti la Fundamenton, dum Claude PIRON estas karakterizulo de vastskala lingvo-uzo.

A.- Persone mi ne renkontis malfacilaĵojn en la legado de la romanoj La Litomiŝla Tombejo kaj La Mortsonorilo de Chamblay de Karolo PIĈ malgraŭ la iom specifa vortaro.

Cl.- Legemulo rapide kutimiĝas al la piĉismoj, kaj estas fakto, ke, kelkaj el ili ekinvas ankaŭ aliajn aŭtorojn, kiel ekzemple la romanon 'Ŝia lasta poŝtkarto' de Sergo Elgo aŭ Georges LAGRANGE. La hodiaŭa verkistaro asimilis kaj uzas multajn nuancojn leksikajn kaj esprimajn, kiuj maturiĝis dum la duonjarcento sekvinta la tridekajn jarojn. Ni ne plu troviĝas en la periodo de Literatura Mondo, kiun karakterizis pasiaj debatoj por aŭ kontraŭ kelkaj

neologismoj, kiel frida kaj kurta. Tiuj vortoj nun vivas kaj eĉ la averaĝa publiko ilin uzas, parolante pri sia fridujo kaj pri kurtonda radioaparato.

A.- En ĉiu lingvo fakte ekzistas lingvo-niveleoj. Sed hodiaŭ televido, radio kaj fakaj revuoj havas riĉigan influon sur la lingvo-uzon de la averaĝa publiko. Aimenau en Svislando ni konstatas, ke eĉ la kamparanoj kaj laboristoj, kiuj ne frekventis superajn lernejojn, havas je sia esprimo dispono multe pli vastan vorttrezoron, ol tio estis antaŭ unu aŭ du generacioj. Unueciĝas la lingvo-uzo, ne plu ekzistas tipaj lingvaĵoj intelektula, laborista kaj kamparana, kiel estis antaŭ la televida erao.

Cl.- Simila pertelevida kaj perradia lingvo-riĉiĝo bedaŭrinde ne okazas en Esperanto, kiel cetere ĝi ne okazas en multaj etlingvoj regionaj, kiel la romanĉa en Svislando. Tiam aperas lingvo-fenomeno kontraŭa, kiu karakterizis multajn sociojn antaŭ la televida epoko: formiĝo de klasoj laŭ la lerteco en la lingvo-praktiko kaj akriĝo de la dialektoj. Esperanto apartenas al tiu lingva mondo sen lernejiĝo, sen vastskale legataj taggazetoj, sen televidaj programoj, kaj kun limigita nombro da legkapablaj homoj. En tiuj lingvaj socioj la kleriĝo estas pli individua, ol grupa, pro manko de la kolektivaj edukrimedoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND remalfermos sian leterkeston por saluti skribintojn. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*